

Sendependa revuo en Esperanto

Tra la mondo

Azia kongreso

Intervjuo

Esperanto en Ĉinio

Esperantistoj

Esperanto-Semajno

Libroj, Poemoj

Muzeo, Historio

Lernejoj, Kursoj

Kunvenoj, Ekzamenoj

komercistoj, Seminario

Scienco, Arto, junuloj

Pensado, Vojaĝo, Donaco

N-ro 1 (1) Januaro 2017

Tra la mondo



Sendependa sezona revuo
fondita la 1-an de januaro 2017
en plenkolora papero A4 (202×268) k
elektronika formato PDF,EPUB,JPEG

Ĉefredaktoro

Trezoro Huang Yinbao

Kunlaborantoj de la aktuala numero

Ardo Hu Guopeng
Arko Gong Xiaofeng
Liu Minghui
Meng Yuli
Anthony Lucas
Zhao Chenghua
Zheng Bochong
Miaohui
Saed Abbast
Wei Shan

Abono

Papera versio: 24,00 EUR
Unuopa ekzemplero 6,00 EUR
Reta versio 6,00 EUR
La reta versio estas senpaga
por verkintoj, kunlaborantoj,
kaj ĉinaj aktivuloj.
Pago al uea-konto "huyi-j"

Kunlabora organizo

Esperanto-Muzeo Zaozhuang Ĉinio

Redakcio

Esperanto-Centro Ora Ponto
Jingchuan-Xian Shijieyu Zhongxin
744300 Pingliang Gansu Ĉinio,
Tel: 86+(933) 3329289, 18893316800
trezoro@qq.com, agrikulturo@126.com

ENHAVO

Azia kongreso

Esperanto por Azia Kunlaboro.....3
Sekretario de KAEM vizitis Internan Mongolion.....4

Intervjuo

Dek novaĵoj el UEA5

Donaco

Ĉinaj esperantistoj donacis al UEA.....5

Muzeo

Eldonitaj Historiaj Restaĵoj pri ĉina Esperanto-Movado6
Memorajoj de la japanaj geedzoj TAKEUTI Yosikazu kaj TOMIKO
konservotaj en la Esperanto-Muzeo6

Kursoj

Rekomenciĝis la E-kurso en la provinco Hainan7
Esperanto-kurso en Zaozhuang-a Universitato.....7
Denove funkcias E-kurso en Huainan.....8
Paroliga kurso de Esperanto en Dandong8

Lernejoj

1400 ĉinaj infanoj festas la Esperantan Semajnon.....9
E-kurso en la Jiangsu-a Teknologia Universitato9

Esperantistoj

Mia volontula laboro en la Centra Oficejo10
Ĉinaj esperantistoj partoprenis en la 89-a SAT11

Historio

“Filo” en interlingvistiko rememoras sian neniam renkontitan “patron” -
nin ligis korespondaj rilatoj12

Scienco

La homaro modifas la rotacion de la Tero!14
ISAE elektis novan Estraron.....14

Recenzoj

Recenzo pri Dao De Jing de Laŭzi15
Rano-Verko de Nobel-premiito MO Yan18

Komercistoj

Alvoko de IKEF-prezidanto Ĉielismo WANG Tianyi17

Ekzamenoj

ILEI sukcese organizis KER-ekzamenojn en Ĉinio.....19

Vojaĝo

Prelega Vojaĝo per Esperanto en Tianjin20
Koreaj kaj japanaj samideanoj vizitis Esperanto-Arbaron en Zaozhuang 20

Kunvenoj

La 31-jariĝo de la Dandong-a Esperanto-Asocio.....21
Esperanto-forumo okazis en Hangzhou Ĉinio21
Sanhaja Esperanto-Asocio okazigis la jarkunvenon 201622
Okazis jarkunveno de la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio22

Seminario

Pekina Esperanto-Asocio okazigis E-seminaron23

Retejoj

Esperanto en Ĉinio.....24
Esperanto-Retejoj en Ĉinio

Poemoj

Sonetoj al Amikoj / L' Unua Neĝo / Neĝohomo25

Pensado

Pensoj post vizito al la loĝejo de SOONG Ching Ling.....26

Infanoj k junuloj

Ĉinaj esperantistetoj en IIK kaj JIK 2016(F).....28

Arto

Amo de papilio al floro (foto de kovrila paĝo)

Dum la volontula laborado en la Centra Oficejo de UEA septembre kaj oktobre 2016, foliumante amason da revuoj en Esperanto el diversaj landoj mi elkovis ideon krei revuon pri Ĉinio kies civitanoj atingas sesonon de la tutmonda loĝantaro. Agado plivaloras multe ol pensado. Jen aperas la revuetto *Tra la mondo* dank' al la kunlaborado de la elstaraj kunlaborantoj. La revuo aperigas/os artikolojn pri diversaj temoj pri Esperanto en Ĉinio. Ĝi bezonas vian flegadon per via rekomendoj, artikoloj, abonado eĉ donaco. Por fortigi kaj bonkvalitigi la revueton la redakcio serĉas volontulajn kunlaborantojn por venontaj numeroj. Bv kontakti la redakcion se vi havas intereson por la kunlaboro de la revuo. Bonan legadon! *Trezoro Huang Yinbao*

Esperanto por Azia Kunlaboro

En la 3a ĝis 6a de novembro la 8-a Azia Kongreso de Esperanto kun la temo Esperanto por la azia kunlaboro en internacia epoko sukcese okazis en pitoreska urbo Quanzhou Ĉinio. Paralele okazis ankaŭ la 5-a ILEI-Seminario en Orienta Azio kun la temo lerni Esperanton per moderna metodo kaj la 10-a jarkunveno de IKEF-Ĉinio. 278 esperantistoj el 20 landoj el kvar kontinentoj partoprenis. La kongreso solene inaŭguris en 14:00 merkrede kaj fruktodone fermis en 15:40 dimanĉe. Antaŭ la inaŭguro LEE Jungkee prezentis 10 gravajn novaĵojn el UEA pri voĉdono por nova statuto, memstariĝo de TEJO, AMO-seminario, aĉeto de domo, Zamenhof Jaro 2017, IJK 2017 en Afriko, Magistra diplomo de Esperanto, Filmo-Festivalo "Teo kaj Amo", nova retpaĝo de Esperanto kaj Oceanio al KAEM. La inaŭguron mesaĝe salutis la



Zhenghui, prezidanto de ĈEL CHEN Haosu faris salutan paroladon en nacia lingvo kun E-traduko.

Dum la kongreso okazis 23 programeroj paralele en 6 ĉambroj, Markus GABOR prelegis pri la agado de la Eŭrazia Kultura Centro, kaj pri indramang- metoda

Esperanto kaj esperantologio, kunlaboreblo inter Eŭropo kaj Azio, Zbigniew GALOR pri Esperanto kaj esperantistoj en spegulo de sociologiaj esploroj, Ragnar BALDURSSON pri Esperanto kiel interkultura komprenigilo, HORI Jasuo pri internacia Esperanto-sumoo+kaligrafio, kaj pri parkera kantado de La Espero + horizonto, WANG Tianyi pri ĉina deveno, ISIKAWA Tiekio pri Esperanto per ekzercaro por japanlingvaj komencantoj, Nema pri landa kongreso, kaj pri tutlanda trejn-sistemo kaj por volontuloj de UK, pri la 50a ILEI-kongreso en urbo Busan, GONG Xiaofeng(Arko) pri E-instruado en Ĉinio, Mireja pri lernado-encerba mirakla procezo, YU Jianchao pri plezuro en legado, CHEN Ji pri lingvolernado en interreta epoko. Ankaŭ Ĉina Radio Internacia prezenti amuzajn programojn ekzemple mane skribi ĉinajn ideogramojn "Unu zono kaj unu vojo" ktp. Ĉiuj aziaj landoj prezentis Esperanto-movadon en siaj landoj. En la kunsido pri landa agado kaj E-movado en la reta epoko oni varme diskutis pri movado en Azio.



prezidanto de UEA Mark FETTES, surpodie salutis la estrarano LEE Jungkee, Ĝenerala Direktorino Veronika Poór, ILEI-prezidantino Mirejo, KAEM-prezidanto WANG Ruixiang. Vicurbestrino WANG Jianping, vicprezidanto de Internacia Eldona Grupo de Ĉinio FANG

lingvoinstruado- spertoj el lingvo-instruado en koreaj kaj tajlandaj universitatoj, SO Gilsu pri azia movado en la komenco(1965-1995), kaj pri la diversaj vojoj al UK Seulo 2017, Ilona KOUTNY pri eŭropaj kaj aziaj trajtoj de Esperanto kaj pri universitata instruado de





La Ĝenerala Direktoro Veronika POÓR donacas librojn al la E-Muzeo Ĉinio



La prezidento de KAEM SO Jinsu

La prelegantoj el Filipino, Indonezio kaj Vjetnamio allogis ĉeestantojn per la junaj vizaĝoj kaj aktivecoj. La plej juna preleganto estas 18-jaraĝa studento Albert Stalin T. GARRID el Filipino. Lia prelego pri la movado en Filipino ege interesigis la ĉeestantojn. Li diris ke mankas ne-junulo por gvidi la movadon en Filipino. Markus GABOR promesis flugi al Filipino por semi kaj akvumi. Oni lanĉis plurajn kompanjojn por instigi multajn partoprenantojn al la 102-a UK, la 50-a ĪLEI-kongreso kaj la 1-a komuna kongreso de IKEF en Koreio 2017. En la kunveno de KAEM-anoj, d-ro SO Jinsu estis elektita kiel KAEM-prezidanto,

s-ro INUMURU Fumio kiel vic-prezidanto kaj s-ro Chimedtseren ENKHEE kiel sekretario. La nova estraro de KEAM deklaris ke la 9-a Azia Kongreso de Esperanto okazos en Vjetnamio. En lasta duontago anstataŭ komunan ekskurson 23 kongresanoj partoprenis KER-ekzamenojn. Abundas programeroj distraj kaj instruaj en nacia kaj internacia vespero, ekskursoj antaŭ, dum kaj post la kongreso.

EPC, CRI kaj eksteraj ĵurnaloj kaj televidoĵoj faris multajn intervjuojn pri la kongreso. Antaŭ kaj Post la kongreso multaj ĉinaj esperantistoj aŭtomate fariĝis ĉiĉeronoj kaj gastigantoj por gvidi aŭ gastigi

fremdlandajn esperantistojn vojaĝi en Ĉinio. En restoracio mi aŭdis ke juna japano diris ke li hontas pro tio ke ĉinaj amikoj ĉiam pagis lian manĝadon. Por sukcesigi la kongreson LKK fondis E-kurson por 40 studentoj kiel volontuloj kiuj aktive laboris por la kongreso. Oni bone semas kaj sukcese akvumas en la kongreso. Ni semas kaj semas, akvumas kaj rikoltas! En ferma parolado la nova KAEM-prezidanto D-ro SO Jinsu diris ke li esperas revidi la volontulojn en venonta kongreso! Tio fakte estas komuna espero de ĉiuj partoprenantoj de la 8-a Azia Kongreso de Esperanto.

Teksto de Trezoro, fotoj de Semio.

Sekretario de KAEM vizitis Internan Mongolion



En la 28a de junio 2016, la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio de Ĉinio akceptis s-ron Chimedtseren ENKHEE, prezidento de Mongola Esperanto-Societo kaj sekretario de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM). Dum la kunsido, la du flankoj prezentis siajn Esperanto-agadojn. Estraranoj kaj membroj de la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio interŝanĝis kun s-ro Enkhee opiniojn pri altigo de Esperanto-nivelo, pri diskonigo de la lingvo kaj pri aliaj aktivadoj. La du flankoj ankaŭ diskutis pri kunlaboro de Esperanto-seminario en 2017, kaj pri turismado, reciproka vizitado kaj aliaj agadoj en la estonteco. Vespere, la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio invitis s-ron ENKHEE spekti la operon "WANG Zhaojun". La akcepton ĉeestis membroj de la konsilantaro de la asocio kaj aliaj Esperanto-aktivuloj de la regiono.

HANG Jianjun

Intervjuo al LEE Jungke **Dek novaĵoj el UEA**

De la 3a ĝis la 6a de novembro en Quanzhou, urbo de Fujian-provinco, suda Ĉinio, sukcese okazis la 8a Azia Kongreso de Esperanto kaj la 5a ILEI-Seminario en Orienta Azio. Antaŭ inaŭguro de la du kunvenoj, s-ro LEE Jungkee, veterano el Korea Respubliko, estrarano de UEA pri Azia, Afrika

kaj Esperanto-Centro-movado, faris prelegon titolitan Dek novaĵoj el UEA. Post la inaŭguro mi intervjuis lin. Dum la intervjuado, s-ro Lee detale malkaŝis la novaĵojn ne nur el UEA, sed ankaŭ el Korea Respubliko. La dek novaĵoj el UEA ankaŭ estas gravaj laboroj de UEA en 2017. Ili estas jenaj:



Sanshan, parolisto de ĈRI faras intervjuon al Lee Jungkee estrarano de UEA

1. Voĉdono por nova statuto
2. Memstariĝo de TEJO
3. Seminario pri Aktuala Maturigo
4. Nova domo por volontuloj
5. Zamenhofa jaro 2017
6. IJK de 2017 okazos en Togolando, Afriko.
7. Magistra diplomo de Esperanto
8. Filmo-Festivalo "Teo kaj Amo"
9. Nova retpaĝo www.esperanto.center.
10. Oceanio al KAEM (Aŭstralio aliĝis al KAEM). *Shanshan, ĈRI*

Donaco

Ĉinaj esperantistoj donacis al UEA

En la jaro 2016, 47 ĉinaj esperantistoj kontribuis 13348.00 juanoj (1800.00 eŭroj) por subteni aĉetadon de Volontula Domo de UEA. La monoj estis akceptitaj de s-ino Stanka Starčević, la kasisto de UEA la 23-an de julio 2016 en Nitro Slovakio dum la 102-a Universala Kongreso de Esperanto. kontakta adreso: financoj@co.uea.org.

Jen la nomlisto de la donacintoj:

Anonimo	1500.00	Wei Yubin	228.00	Zhao Jie	100.00	Zhang Wei	75.00
Huang Zhiming	1100.00	Sun Mingxiao	200.00	Deng Yiqiao	100.00	Liu Minghui	72.00
Huang Yinbao/Trezoro	1024.00	Meng Yuli	200.00	Wang Weidong	100.00	ZhanXingxiang	66.00
Huang Enliang	1000.00	Zhao Yunfeng	200.00	Shi Xueqin	100.00	Cui lianhua	66.00
Zhang Ping/ĝoja	850.00	Tan Xiayi	200.00	Chen Zhihong	100.00	Qian Jiawei	50.00
Han Suxian	750.00	Chen Jiansheng	200.00	Liu Xiaozhe	100.00	6 homoj sube	99.00
Wu Xiaoyan	750.00	Chen Zaiwei	200.00	Tan Jiangying	100.00	Xu Jinneng	
Song Ping	600.00	Xu Weizhao	200.00	Peng Zhengming	100.00	Cao Baozhu	
Lin Chaohui	600.00	Xiao Huoli	200.00	Yuan Ying Chun	100.00	Liu Jinhuan	
Li Jiaquan	580.00	Tang Yong	150.00	Cui Jianhua	100.00	Li Zhongmin	
Gu Yulin	500.00	Lin Lisha	100.00	Ye Peixue	100.00	Yang Zongwu	
Xiao Ke	300.00	Zhu Yonghan	100.00	Zhou Zhiqi	88.00	Li Zeyao	

Danka letero el UEA

Karaj donacantoj,

Mi elkore dankas la eblon al la redaktoroj de la revuo *Tra la mondo* doni al mi spacon por esprimi mian kaj nian grandan dankon pro via subteno, kiu ebligis ke jam en 2016 ni povu aĉeti domon por la

volontuloj en la Centra Oficejo. Ĝi helpas por ke samtempe pluraj aktivemuloj kaj volontuloj povu spertiĝi en la Centra Oficejo, kaj subteni kaj helpi ties laboron. Sen tio pluraj aferoj, ekzemple la renovigo de la administra sistemo devus multe

pli longe atendi. Ni tre dankas vian efikan kaj amasan subtenon por la sukceso de nia movado!

D-ino Poór Veronika
Ĝenerala Direktoro de UEA

Eldonitaj Historiaj Restaĵoj pri Ĉina Esperanto-Movado

La 24-an de oktobro atingis Esperanto-Muzeon la libro Historiaj Restaĵoj pri Ĉina Esperanto-Movado el 15 volumoj en la ĉina lingvo kaj Esperanto eldonita de Fenikso-eldonejo en la provinco Jiangshu, sudorienta Ĉinio, en septembro de la kuranta jaro.

S-ro CAO Shengqiang, rektoro de la Zaozhuang-a Universitato kaj konstanta komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo, gvidis la kompilon de la libro kaj s-ro Semio SUN Mingxiao, asistanta ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj respondeculo de



Esperanto-Muzeo en la universitato, funkciis kiel ĉefredaktoro de la libro, kies materialoj venis el la libroj kolektitaj de Esperanto-Muzeo en la Zaozhuang-a Universitato.

Tiu libro temas pri Esperanto-Movado en moderna Ĉinio, estas utila por studado pri Esperanto kaj pri Esperanto-movado en Ĉinio.

Semio SUN Mingxiao

Memoraĵoj de la japanaj geedzoj TAKEUTI Yosikazu kaj TOMIKO konservotaj en la Esperanto-Muzeo Zaozhuang-a Universitato

Lastatempe memoraĵoj de la forpasintaj geedzoj Takeuti Yosikazu kaj Tomiko kolektitaj kaj ordigitaj de la Esperanto-Societo en Takatuki de Japanio, estis transdonitaj de la Changzhou-a Esperanto-Asocio al la Esperanto-Muzeo en Zaozhuang-a Universitato, orienta Ĉinio. La memoraĵoj inkluzivas foto-aparaton,

ekzempleron de la Plena Ilustrita Vortaro, librojn kaj fotojn de la geedzoj.

Prof. d-ro Sasaki Teruhiro, eksprezidanto de la Komisiono de Azia Esperanto-Movado (KAEM) de UEA, kaj s-ro Sun Mingxiao (Semio), vicĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, atestis la

akcepton de la memoraĵoj fare de la muzeo.

S-ro Takeuti Yosikazu naskiĝis en 1931 kaj forpasis en 2005. Li eklernis Esperanton en 1946 dum sia studado en la Komerca Lernejo Sizyô en Kioto. Li estis unu el la fondintoj de la Esperanto-Societo en Takatuki. Li servis kiel prezidanto



Rekomenciĝis la E-kurso en la provinco Hainan

La 20-an de oktobro rekomenciĝis la nedeviga E-kurso en la Hainan-a Fremdlingva Kolegio de Profesia Edukado. Ĝin gvidis WEI Shan (Montego), veterana esperantisto kaj vicprezidanto de la Hainan-a Esperanto-Asocio, kaj al tiu ĉi dua leciono ĉeestis 30 studentoj. La studentoj diligente lernis kaj jam regas la prononcon kaj literumon de Esperantaj literoj.

Salutparolas CAI Wei, honora prezidanto de la Hainan-a Esperanto-Asocio.

Tio estas fakte rekomenciĝo de la E-kurso en tiu ĉi kolegio, ĉar la 20-an de marto okazis la unua leciono de la kurso. Siatempe ZHAN Xingxiang, studento de la kolegio, interesiĝis pri Esperanto, kiam li legis pri la Internacia Lingvo en Interreto. Li informiĝis, ke WEI Shan loĝas en Hainan, kaj tuj vizitis



lin. Sekve, ZHAN Xingxiang faris propagandon al la estraranoj de la kolegio kaj akiris ilian subtenon. Sub helpo de la loka E-asocio li okazigis la unuan E-lecionon, kiu altiris 35 lernantojn.

Post la someraj ferioj, ZHAN

Xingxiang denove kaj sukcese petis la kolegion okazigi E-kurson. Li raportis tion al la E-asocio kaj estis subtenata de ĝiaj estroj. Ili vizitis la kolegion, salutis al la kurso, esprimante al ĝi sian gratulon.

WEI shan

Esperanto-kurso en Zaozhuang-a Universitato

En la 19-a de oktobro, la kurso de Esperanto, okazigita de la Esperanto-Asocio de Zaozhuang-a Universitato ekfunkciis en Esperanto-Muzeo en la universitato, kun la celo esperantistigi junulojn por la 102-a UK. Pli ol 60 studentoj lernas en la kurso. D-ro BAK Giwan, nia korea samideano instruanta la korean lingvon en la universitato kaj s-ro Sato, nia japana samideano instruanta la japanan tie, konigis Esperanton al la kursanoj en la unua leciono. La kurson gvidas s-ro Semio SUN Mingxiao, vicĝenerala sekretario de ĈEL kaj respondeculo de Esperanto-Muzeo en la universitato.

Teksto de Semio ,Fotoj de Amikia



de la Konsilio de Kulturaj Grupoj de Takatuki, prezidanto de la Japana-Ĉina Amikeca Asocio de Takatuki, estrarano de la Internacia Asocio de Takatuki, k.a. Li sukcese ĝemeligis la japanan urbon Takatuki kun la ĉina Changzhou. Li preskaŭ ĉiujare vizitis la ĝemelan urbon Changzhou

kaj aktivis per Esperanto kun tieaj esperantistoj. De 1984 li klopodis por la movado en Azio kaj poste fariĝis la unua prezidanto de KAEM. Plie li laboris dum 1992-2004 kiel membro de la komitato de UEA kaj en 2004 li estis elektita kiel honora membro de UEA.

En 1934, s-ino Takeuti Tomiko naskiĝis en Japanio kaj forpasis en 1998. Ŝi eklernis nian lingvon en sia unua lernoĵaro en mezlernejo. En 1961 ŝi edziniĝis kun Takeuti Yosikazu.

Sun Mingxiao

Denove funkcias E-kurso en Huainan

En la fino de julio en la urbo Huainan de Anhui-provinco, ankaŭ nomata karb-urbo, rekomenciĝis Esperanto-kurso. La kurso, gvidata de eksa vicprezidanto de Anhui-a Esperanto-Asocio YANG Haichun, altiras ĉirkaŭ 20 homojn, interalie plejparto estas plenkreskuloj kaj tri estas elementaj lernejoj. La kurso funkcias matene de ĉiu sabato, kaj laŭplane finiĝos en la fino de la kuranta jaro.

En la fino de aŭgusto LIU Baoguo, esperantisto el Hefei, ĉefurbo de Anhui-provinco, vizitis la kurson kaj konigis al la kursanoj Esperanto-aktivecojn en kaj ekster Ĉinio. Informiĝinte pri la 8a



Azia Kongreso de Esperanto en Quanzhou, multaj lernantoj esprimis deziron ĉeesti la kongreson por percepti la etoson kaj ĉarmon de Esperanto.

Esperanto-movado de la urbo kulminis en la 1980aj jaroj, kaj post tio longtempe silentis. Estas ĝojige, ke Esperanto-kurso denove funkcias en la urbo.
YANG Haichun



Paroliga kurso de Esperanto en Dandong

Antaŭtagmeze de la 17a de junio 2016 oficiale komenciĝis paroliga kurso de Esperanto-klubo de

Dandong-a Zhiqing-a Branĉo de la provinco Liaoning en nordorienta Ĉinio. La kurson sekvas pli ol 50

lernantoj, kiuj plejparte laboris en kamparo post diplomiĝo el lernejoj de 1950-aj ĝis 1970-aj jaroj kaj poste revenis al urbo por laboro en diversaj rondoj.

S-ro MA Fengchen, direktoro de la Esperanto-klubo, gvidas la kurson, kiu funkcias de la 9-a ĝis la 11-a horo marde kaj vendrede en la oficejo de la klubo. La ĉefa tasko de la kurso estas Esperanto-parola ekzercado, kaj tio daŭras ankaŭ perrete: nun pli-ol-120-persona WeChat-grupo viglas ĉiutage por lernado de Esperanto. Pere de interreto pli da supre menciitaj personoj interkonatiĝas kaj renkontiĝas por lerni kaj uzi Esperanton. La Esperanto-klubo starigita la 12an de junio 2016 nun havas pli ol 100 membrojn.

WANG Lihua de EPC
Foto de YU Bingheng



1400 ĉinaj infanoj festas la Esperanto - Semajnon

Wei Yubin

La 12-an de decembro 2016, la elementa lernejo Baiyangshujie en Taiyuan-urbo de Shanxi-provinco Ĉinio okazigis la 4-an Esperanto-semajnon kun la temo Kun Granda Animo kaj Amikoj en la Mondo. Pli ol 1400 lernejoj ĝin partoprenis. En la malferma ceremonio Wei Yubin (Esperanta nomo: Jado), direktoro de la lernejo, diris: “Antikvulo de Ĉinio diris, ke nobeloj havas grandajn amon kaj animon. Mi opinias, ke la lernejoj de Baiyangshujie ne nur devas esti honestaj, diligentaj kaj progresemaj, sed ankaŭ devas havi pli vastan perspektivon, kompateman koron, animon por la tuta homaro, kaj ideojn de egaleco kaj frateco.”

La lernejo okazigas Esperanto-kurson

ekde la jaro 2008 por helpi infanojn lerni la lingvon. Dum la instruado oni rimarkis, ke la interna ideo de Esperanto estas tre utila por la infanoj starigi aktivan vidmanieron al la mondo. Do, ekde la jaro 2013, ĉiujare ĉirkaŭ la Zamenhofa Tago la lernejo okazigis Esperanto-semajnon. En la semajno la nacia kaj Esperanta flagoj alte flirts super la lerneja sportejo, infanoj partoprenis Esperantajn programerojn, kaj la instruistoj preparis diversajn lecionojn pri Esperanto. La lernantoj kantis, dancis, pentris, verkis, legis kaj festis. La semajno jam fariĝis tre ŝatata festivalo por la infanoj.

Wei Yubin, direktoro de la elementa lernejo Baiyangshujie en Taiyuan-urbo



Wei Yubin(Jado), esperantista direktoro de la lernejo malfermis la E-semajnon



La infanoj kun verdaj flagoj festas



La infanoj salutas al gepatraj spektantoj invititaj



La infanoj de la lernejo prezentas programon en Esperanto

E-kurso en la Jiangsu-a Teknologia Universitato sudorienta Ĉinio

La 13-an de oktobro 2016, la nedevisa Esperanto-kurso ekfunkciis en la Jiangsu-a Teknologia Universitato de la urbo Changzhou, la provinco Jiangsu, sudorienta Ĉinio. La kurso kun 150 studentoj

el diversaj fakoj de la universitato estas gvidata de s-ro ZHANG Changsheng, prezidanto de la loka Esperanto-Asocio kaj longtempa gasta instruanto de la universitato. La kurso kun 33 lernohoroj okazis

ĉiusemajne kaj finiĝis la 22-an de decembro. Post trapaso de ekzameno la studentoj povos akiri du studpoentojn.

S-ro ZHANG instruis Esperanton per la materialoj de la retejo "lernu.net" kaj helpas studentojn memlerni Esperanton per la retejo. Nun, en multaj lernejoj studentoj lernas Esperanton en unu klasĉambro. Do, kiel kontroli la Esperanto-lernadon de tiom da lernantoj en unu ĉambro? Tio estas grava problemo. S-ro ZHANG volas fari esploradon laŭ sia instrusperto, kiel evoluigi la eblecon de perreta lernado, kaj kuraĝigi studentojn vere ekuzi la lingvon kaj eniri la Esperanto-komunumon post la finiĝo de la kurso.

Nun en la universitato fondiĝis Esperanto-societon por studentoj. Ĝi fojfoje organizis memlernadon de la lingvo.

ZHANG Changsheng



Mia volontula laboro en la Centra Oficejo de UEA

■ *Trezoro Huang Yinbao*

Antaŭ mia alveno al CO la Ĝenerala Direktoro Veronika rete demandis kion mi preferas fari. En Ĉinio ordinara laborantoj ne rajtas memelekti taskojn laŭplaĉe, oni nur atendas ordonon kaj taskan disdonon de ĉefo; se ili deziras resti longe dungita, ili bone laboras; male ili plej eble estos maldungitaj. Ŝia demando kuraĝigis min pensi kion mi preferas. Tamen mi tute ne bone sciis kion oni faros en CO, kaj kion mi povos fari. La 2-an septembro mi atingis CO-n por komenci la volontulan laboron. Feliĉe mi vere povas mem elekti taskojn, multaj laboroj atendas homfortojn. Mia ĉefa celo estis lerni, praktiki kaj trejniĝi en CO, kaj kiel komitatano C kaj membro de financa komisiono profunde studi kaj esplori kiel plibonigi nian aferon. Mi respondis al Veronika ke mi esperas fari diversspecajn laborojn. Mi esperas ke la diverseco donos multajn ŝancojn por multe lerni.

En CO mi faris diversajn laborojn ekzemple, redaktis Esperantajn kaj ĉinlingvajn vikipediajn UEA-paĝojn pri UEA, pri Esperanto kaj rilataj aferoj, registris diversajn turismajn broŝurojn kaj periodaĵojn, ordigis la bibliotekon, provlegis la revuojn



Esperanto kaj Kontakto foje ankaŭ urĝajn dokumentojn, voĉlegis novajn numerojn de Esperanto, aldonis ĉinajn ideogramojn al la adresaro de ĉinaj membroj aŭ abonantoj (tio altigas la ŝancojn de sukcesa livero), helpate de la redaktoro plibonigis kaj riĉigis la ĉinlingvan paĝaron de la multlingva retejo de Esperanto,

kreis retan UEA-butikon por faciligi la uzon de la ĉina esperantistaro, skribis kaj rete aperigis ĉinlingvajn artikolojn por konsciigi kaj informi la ĉinlingvan publikon pri UEA kaj pri Esperanto, skribis projektojn, varbis individuajn membrojn kaj aliĝintojn de UK, varbis reklamojn por la revuo Esperanto, revigligis dormantan fakan asocion, tradukinte dissendis al Ĉinio kaj ĉinaj esperantistoj diversajn informojn de UEA kaj de Esperanto por informi kaj konsciigi ilin. Mi kiel konsiliano kaj komitatano post loka observado kaj esplorado faris ankaŭ proponojn al la Estraro, la komitato kaj la Ĝenerala Direktoro por plibonigi niajn procedurojn, rete kontaktis ĉinajn organizojn kaj personojn por plibonigi kunlaboron kaj disvastigon de Esperanto.

En CO mi loĝis en la ĉambro Kanado komence. La 17-an de oktobro lunde mi fariĝis la plej feliĉa volontulo kiu unue translokiĝis al



la Volontula Domo aĉetita en sama strato kun CO. En la domo troviĝas dormaj ĉambroj, komunaj kuirejo, duŝejo, necesejoj en ĉiuj etaĝoj. Ĉiuj volontuloj havas propran privatan spacon. La tipa nederlanda ŝtuparo kaj ligna ruĝa planko en la loĝejo ege plaĉas al mi. La domo estas pli komforta ol la ĉambroj en CO. Ĉirkaŭ la domo estas diversaj vendejoj. Ni povas facile kuiru tipajn naciajn manĝaĵojn laŭ propra plaĉo en la vasta komuna kuirejo. Ni povas facile retumi side aŭ kuŝe surlite kaj libere voĉe babili kun familianoj kaj samlandanoj rete tute senpage. En lasta dua dimanĉo antaŭ mia reveno al Ĉinio mi rimarkis ke en du grandaj magazenoj tre proksimaj al la Volontula Domo la varoj estas multe pli malkostaj ol tiuj en vendejoj ĉirkaŭ CO. En Ĉinio mi neniam tuŝis biciklon dum ĉirkaŭ 20 jaroj. En la bicikla lando mi komencis ŝati bicikladon. Mi ĝuis amuzan bicikladan vojaĝon sabate kaj dimanĉe por bone vidi diversajn interesajn aferojn kaj belegajn pejzaĝojn ene kaj ĉirkaŭ la urbo. Por iri al CO mi preferis piede iri. Tio estas pli bona maniero por moviĝe ekzerci kaj bone vidi interesajn pejzaĝojn kaj amuzajn aferojn. La distanco inter la loĝejo ĝis CO estas nur kilometro, bicikle 3 minutojn, piede 10-12 minutojn. Dum paŭzaj tempoj ni kuiris aŭ simple preparis manĝaĵojn en la kuirejo de CO, manĝante babilis kun kolegoj aŭ



aŭskultis interesajn rakontojn en la kafejo. Dum kafaŭzo mi vidis ke ĉiuj homoj venis el tute malsamaj nacioj. Ni vivis kaj laboris en vere internacia kaj Esperanta etoso! En CO mi havis ŝancojn renkontiĝi kaj amikiĝi kun vizitantoj el Barato, Germanio, Usono, Belgio ktp. En la Biblioteko Holder mi propraokule vidis multajn valorajn historiajn librojn kaj artikolojn, kaj bonŝance skanis miajn artikolojn aperigitajn antaŭ multaj jaroj en diversaj gazetoj. Mi eĉ invitite faris prelegon en Antverpeno, la invitanto pagis miajn vojaĝon, manĝadon, kaj mi tranoktis en la hejmo de bonkora esperantisto. Mi feliĉe ĉeestis ankaŭ

studan kunvenon de la nederlanda sekcio de ILEI.

Plurobla bedaŭro ĉagrenigis min en CO. Mi registris multajn historiajn periodaĵojn, foliumis multajn valorajn librojn, tamen tralegis nenion pro tempomanko. Mi renkontis kaj kunlaboris kun elstaraj kolegoj kaj vizitantoj, tamen ne povis profunde babili pro la okupiteco. Mi rajtis ĝui grandan rabaton favorantan al volontuloj ĉe libroservo, tamen mi povis aĉeti nur tre malmulte pro la kosto terura laŭ ĉinaj normoj. Mi vere ĝuis la laboradon kaj la vivadon en koro de Esperantio, tamen mi devis reveni al Ĉinio. Ĝis revido, karaj kolegoj!

Ĉinaj esperantistoj partoprenis en la 89-a SAT

De la 16-a ĝis la 23-a de julio daŭras en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz, Germanio, la 89-a SAT-kongreso (la kongreso organizata ĉiujare de la Sennacieca Asocio Tutmonda). Inter la 86 partoprenantoj el 18 landoj, estas 4 ĉinaj esperantistoj.

Antaŭtagmeze de la 18-a de julio laŭ la loka tempo inaŭguriĝis la kongreso. La partoprenantoj el diversaj landoj sinsekve faris sian saluton al la kongreso. Japanaj esperantistoj propagandis la 103-an Japanan Esperanto-Kongreson, koreaj esperantistoj diskonigis la 102-an UK kaj la 90-an SAT-

kongreson okazontajn en 2017 kaj invitis ĉeestantojn. GONG Xiaofeng, kiel reprezentanto de ĉinaj esperantistoj, faris parolon.

En la Vespero komencita je la 21-a horo, Peter ZILVAR kaj Zsófia KÓRÓDY el la Esperanto-urbo, konigis al alilandaj esperantistoj lokajn vidindaĵojn kaj rakontojn pri la Esperanta urbo. La titolo de Herzberg am Harz kiel "la Esperanto-urbo" estas oficiale aprobata de la urba registaro. En 2016 oni festas la 10-jaran jubileon de tiu aprobo.

La Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) estas sendependa, neŭtrala

tutmonda Esperanto-asocio. SAT estas ligita al la Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA-oj), ĝi fondiĝis en 1921 kiel organizaĵo de la laborista Esperanto-movado. SAT havas sennaciecan strukturon. La membroj aliĝas individue, kaj ne pere de landa sekcio. La asocia strukturo estas konsekvence bazita sur uzo de komuna lingvo (Esperanto) kaj gravas, ke SAT ne havas naciajn sekciojn kaj ĝiaj aktivaj membroj nur estas individuoj. SAT multe eldonas librojn, kaj inter ili la plej grava estas la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. La asocio publikigas legaĵojn ankaŭ sur la interreto.

GONG Xiaofeng

pri Detlev BLANKE


"Filo" en interlingvistiko rememoras sian neniam renkontitan "patron" - nin ligis korespondaj rilatoj

■ Liu Haitao

Multaj kiuĵ konis Detlev BLANKE certe konsentos kun mi, se mi karakterizas lian personecon per jenaj vortoj: helpemo, kunlaboremo, afableco, vigleco. Mi povas ankaŭ diri, ke li estis kompetenta sciencisto, instigema mentoro, kaj honesta idealisto. Sed tiom multaj viveroj ligis nin du, ke ni fariĝis pli ol amikoj kaj fakaj kolegoj.

Por mi fakte Detlev BLANKE estis la "spirita patro", kiel skribis Renato Corsetti en la sekva retmesaĝo je 2004-08-09 al mi. La mesaĝo temis pri mia prelego en Strategia Forumo dum la 89-a UK en 2004. Renato kopie sendis ĝin ankaŭ al Detlev skribante: *Detlev, vi ricevas kopion, ĉar vi estas la spirita patro de LIU Haitao, kaj vi rajtas patre fieri pri li.*

En 2009 aperis mia ĉinlingva libro *Dependa gramatiko: el teorio al praktiko*, kiu baziĝas sur mia doktora disertacio. En ĝia postparolo mi dankas Detlev per jenaj vortoj: *Liaj multjaraj instigoj kaj subtenoj*



igis min kredi, ke lingvistiko estas eble la destino de mia vivo.


Detlev siaflanke iam skribis al mi jenon, kaj tion mi ofte rememoras eĉ nun: *Mi certas, ke ankaŭ en via ĉefa profesio vi estas brila. Tamen, pri interlingvistiko en via grandega lando krom vi, apenaŭ iu serioze okupiĝas. Vian vivo-kontribuon "por la eterneco" oni eble ne mezuros laŭ via laboro en via entrepreno (retmesaĝo, 2000-04-16). Tiam mi pretiĝis ŝanĝi mian profesion de tiu de inĝeniero en entrepreno al tiu de profesoro en universitato.*

La komenco

Do kiel mi renkontis mian "spiritan patron"? En 1981 mi komencis lerni Esperanton, kaj en la fino de 1987 interesiĝis pri interlingvistiko kaj esperantologio. Tamen mi ne povis trovi fakajn dokumentojn pri la temo. Tiam mi loĝis en Qinghai, okcidenta Ĉinio, malproksime de grandaj urboj. Mi kredas, ke siatempe kie ajn en Ĉinio estis malfacile trovi tiajn materialojn, aŭ eĉ nun la problemo ekzistas. Do, ĉirkaŭ la jarkomenco de 1988 mi skribis al Detlev por peti lian helpon. Mi klare memoras, ke je 1988-04-25 mi ricevis du germanlingvajn librojn de Detlev: *Internationale Plansprachen* (Internaciaj Planlingvoj) kaj *Esperanto und Wissenschaft* (Esperanto kaj Scienco). Ilin Detlev ekspedis je 1988-04-07, kiel montras liaj subskriboj en la sekvaj fotoj.

Fakte, la du libroj malfermis por mi la pordon al interlingvistiko kaj esperantologio. Retrorigardante la historion de interlingvistiko, Internationale Plansprachen jam fariĝis klasika verko en la kampo. Do, dank' al Detlev mi vere havis bonan komencon al la vojo de interlingvistiko.

En 2011, okaze de la 70-jariĝo de Detlev, Ulrich Becker redaktis bibliografion de la publikaĵoj de



Detlev Blanke. La bibliografio enhavas 1284 dokumentojn verkitajn de Detlev en 1958-2011. Sendube, ĉiuj dokumentoj estas gravaj por koni la akademian ideojn de Detlev. Sed plej multe influas min ĝis nun Internationale Plansprachen krom la pli posta Interlinguistische Beiträge (Interlingvistikaj Kontribuoj).

Ni neniam renkontiĝis fizike, nur koresponde

Estas tre bedaŭrinde, ke ni neniam renkontis unu la alian. Detlev ĉeestis la 71-an UK-on (1986) en Pekino, sed mi ne, pro la siatempa studrestado en Usono. La alian, 89-an UK-on (2004) en Pekino mi partoprenis, sed Detlev ne. Foje ni ja diskutis eblecon de nia renkontiĝo, kiel Detlev skribis je 2000-04-17: *Vi povus veni nur al Berlino por 2-3 semajnoj (au malpli, laŭ viaj ebloj) kaj trankvile labori en nia explorejo (fakte aparta domo). De Berlino eblus atingi diversajn interesajn homojn kaj lokojn dum 3-8 horoj: ekz. Schubert, biblioteko de Aalen, Fiedler en Leipzig ktp. Kompreneble, vian kompletan restadon ni kovrus.*

Ni tamen multege korespondis unue per paperaj leteroj kaj poste per retmesaĝoj. En la daŭro de 28 jaroj, t.e. ekde la komenco de 1988 ĝis la

subita forpaso de Detlev en aŭgusto 2016, ni interŝanĝis pli ol 1 000 leterojn kaj retmesaĝojn!

Dum tiuj jardekoj Detlev ankaŭ sendis al mi sume pli ol 100 gravajn librojn kaj aliajn dokumentojn pri interlingvistiko. En diversaj etapoj, por certigi la alvenon de la sendaĵoj Detlev ĉiam petis min sendi al li mian adreson en ĉinaj ideogramoj.

Tiam la libroservo de UEA ofte ricevis multajn mesaĝojn de Detlev kun simila enhavo kiel tiu ĉi datita je 2001-09-07: *Kara Simo, (...) mi mendas por LIU Haitao la Suplementon al la bibliografio de disertacioj de Symoens. Bv. sendi la materialon al li kaj ŝarĝi mian*

konton. Amike, Detlev. Sendube, mi ne estus fariĝinta interlingvisto sen Detlev.

Krom interlingvistiko, miaj aliaj esplorkampoj estas komputila lingvistiko kaj kvanta lingvistiko, kaj tiujn ne studis Detlev. Tamen, Detlev helpis min ankaŭ por trovi necesajn librojn kaj dokumentojn en tiuj kampoj, se mi ne povis akiri ilin aliamaniere, precipe dum mia doktoriĝo. Li ankaŭ helpis min deĉifri malfacilajn germanajn frazojn, kiam miaj scioj de la germana ne plu helpis min.

Memoroj pri viveroj

Krom la fakaj helpoj donitaj

de Detlev al mi, por mi la plej memorindaj estas aferoj pri la vivo. Kelkajn ekzemplojn mi eltiras el la retmesaĝoj de Detlev al mi:

Ĉiutage ĉe ni oni aŭdas informojn pri la nova pulm-malsano SARS. Ĉu via universitato funkcias normale? Aŭ ĉu estiĝis problemoj? Se oni ne baldaŭ ion povos fari, mi timas pro la UK en 2004. Kiel fartas vi kaj via familio? (2003-04-24)


Ni aŭdis kaj vidis (en TV) pri la terurega tertremo en via lando. Wera kaj mi esprimas al via popolo nian solidarecon kaj kunsenton. (2008-5-14)

Wera kaj mi tre kore gratulas al vi pro via sukcesa defendo de via doktora disertacio. Ekde kiam ni konatiĝis kun vi, ni rapide ekkonsciis pri via nekutima talento, multflankeco kaj grandega laborpotencialo. Pro tio ni siatempe admiris vian profesiaŝanĝon kaj la karieron, kiun vi komencis kiel profesoro. Do, ni deziras al vi pluajn sukcesojn kaj ne dubas pri tio, ke ni iam persone - vidalvide - konatiĝos kun vi helpe de Esperanto. (2006-05-27)

Ve! Kia bedaŭro, ke por mi neniam eblos vidalvide renkonti Detlev...

La aŭtoro, Prof. d-ro LIU Haitao diplomiĝis pri elektrotekniko de la Universitato Xi'an en 1983. De

1983 ĝis 2002 laboris kiel inĝeniero, supera inĝeniero kaj eminenta inĝeniero en la Alumina Kompanio de Ĉinio (CHALCO), Xining kaj Pekino. De 2002 ĝis 2010 profesoro en la Komunika Universitato de Ĉinio, Pekino. En 2006 doktoriĝis ĉe la sama universitato. Ekde 2010 ĝis nun eminenta profesoro de la Universitato Zhejiang, Hangzhou, Ĉinio. Aŭtoro de ĉ. 150 publikaĵoj pri lingvoj kaj lingvistiko. Ĉefaj esplorkampoj: kvanta lingvistiko, dependa gramatiko, lingvaj kompleksaj retoj, lingvo-planado kaj lingvo-politiko kaj interlingvistiko. En 2016 estis elektita al la Akademio de Esperanto. (pli ampleksa versio aperis en retejo de EPC redaktita de USUI Horiyuk).



Periodaĵoj 2017 por ĉinaj abonantoj

Monato 263,00 RMB (papera)
144,00 RMB (reta)

La Ondo de Esperanto (reta)
113,00 RMB

La Gazeto 160,00 RMB

Literatura Foiro 210,00 RMB

Beletra Almaako 210,00 RMB

Esperanto 143,00 RMB

Kontakto 95,00 RMB

Tra la mondo 26,00 EUR (papera)
6,00 EUR (reta)

abono ĉe:

Redakcio de *Tra la mondo*
Esperanto-Centro Ora Ponto
Jingchuan-Xian Shijieyu Zhongxin
744300 Pingliang Ĉinio
Tel: +86-18893316800, trezoro@qq.com,
agrikulturo@126.com



La homaro modifas la rotacion de la Tero!

■ *Anthony Lucas*

La Tero rotacias en iomete malpli ol 24 horoj. Ĉiuj tion scias. Tamen, mito sugestas ke homo kapablas modifi tiun valoron, agante sur la rapideco de la planeda rotacio. Vera aŭ malvera? 23 horojn kaj 56 minutojn bezonas nia planedo por realigi plenan rotacion. Laŭ fakulo, ĝia rotacia rapideco estas je 465 metroj sekunde aŭ 1670 kilometroj hore ĉe ekvatoro.

Tiu rapideco estas influita de multaj faktoroj sed ĉu homo estas unu el ili? Mito asertas ke l'homo kapablas modifi la rapidecon de la tera rotacio. Vere! Oni jam tion faris!. Dank'al konstruaĵo startigita en 2000: La baraĵo de la tri Foldoj sur Yangzi Jiang, la pli granda riverego el Azio.

Konstruita en la provinco de Hubei ne Ĉinio, la baraĵo de la tri Foldoj estas la plej granda baraĵo akvaroelektrika el mondo

Startigita en 2009 kaj finita en 2012, ĝi havas potencon je 22500 megavatoj kaj jaran produkton je 98.8 miliardoj da kilovathoroj. Por tion fari, ĝi estu giganta. 1.335 metroj longa la baraĵo detenas akvostokon je 154500 hektaroj. Tial, ĝi detenas 45.3 miliardojn da metroj kubaj da akvo ĉu 42 miliardojn da tunoj lokigita je 175 pli alta ol la marnivelo. Tiu akvokvanto modifis



la incian momanton de nia planedo rotacianta.

Alidirite, la homo modifas la dispartigon de la tera maso ĉirkaŭ ĝia rotacia akso. Tio kaŭzas malrapidigon de ĝia rotacio!

Ĝlitanto faras pirueton multe pli rapide se li metas siajn brakojn laŭkorpe ol se li metas ilin horizontale. Por la tero, la fenomeno samas. Ju pli la maso estas granda kaj fora el ĝia rotacia akso (do pli proksima de la ekvatoro ol polusoj) des pli ĝi malrapidegos la rotacion de la Tero. Sed, ne panikiĝu pro tio! La rotacio de la tero ne haltos pro la ĉina baraĵo! Fakte, eĉ se la akvomasa

ŝajnas al ni giganta, ĝi havas tre malfortan efikon. Laŭ NASA, ĝia ĉeesto plilongdaŭrigas la rotacion de la Tero je 0.06 mikrosekundo kaj faras la Teron iomete pli ronda ĉirkaŭ ĝia ekvatoro kaj iomete pli plata ĉirkaŭ polusoj. Konsiderante la rotacian akson, la akvomasa de la baraĵo ĉina translokas la polusojn je 2 centimetroj.

Aliaj fenomenoj modifis la rotacion de la Tero. Ekzemple, la sistemo ekiĝinte en 2004 en Sumatra plilongdaŭrigis la Terorotacion je 2.68 mikrosekundoj.

ISAE elektis novan Estraron

La 12-an de decembro 2016 Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) voĉdone elektis la novan estraron. La Estraro de ISAE por la periodo 2017-2020 konsistas el prezidanto Anthony LUCAS (Francio), vicprezidanto Wendel PONTES (Brazilo), kaj estraranoj Johannes MUELLER (Germanio), Orlando RAOLA (Usono), Francesco MAURELLI (Italio), Ana RIBEIRO (Francio) kaj Trezoro HUANG Yinbao (Ĉinio). La asocio, fondita

en la jaro 1906, estas la unua esperantlingva asocio, kies fakuloj el ĉiuj sciencaj kampoj, profesiaj aŭ amatoraj, kaj interesatoj pri sciencaj aferoj unuiĝis al mond vasta scienca asocio, uzanta la internacian lingvon Esperanto en scienco kaj tekniko. La asocio estas la plej malnova fakasocio en Esperantujo. Laŭ la statuto la celo de la asocio estas disvastigi Esperanton en ĉiuj sciencaj kaj teknikaj sferoj, kaj samtempe progresigi la pretecon ĉe la publiko

por akceptado de Esperanto. La malnova estraro de ISAE dum UK 2015 en Lillo decidis disponebligi la enhavojn de *Scienca Revuo* senpage laŭ krea komunajo (CC-BY-ND) tuj post ilia apero. La asocio ne plu postulas membrokotizojn. La enspezoj de ISAE povas veni nur per donacoj kaj per vendo de la jara papera libro. Interesiĝantoj rajtas senkotize aliĝi ĉe <https://scienca-revuo.info/user/register>.

(el *Scienca Revuo*)

Recenzo pri Dao De Jing de Laŭzi

esperantigita de WANG Chongfang

■ *Eugene de Zilah*

Prezenti la Dao De Jing-on estas kvazaŭ enpuŝegi jam malfermitan pordon. Ŝajne la Dao De Jing estas universale konata, same kiel la Evangelio laŭ Mateo, aŭ la Sankta Korano. Temas pri relative mallonga (ĉirkaŭ 80-paĝa, 5000-ideografia) saĝo-teksto, verkita antaŭ pli ol 2000 jaroj. Sed tiu saĝo-teksto elmetas pli da ambigueco, ol iu alia. La ambiguaĵoj komenciĝas jam en la titolo ŝajne netradukebla de la verko. Kion alian ol netradukeblon ilustras la fakto, ke en preskaŭ ĉiuj etnaj lingvoj la verko estas konata per pli-malpli lerta transskribo de la ĉina titolo, pinjine: Dao De Jing. Oni ofte parolas, por eviti tiun ĉi malfacilaĵon en la titolo-traduko, pri La Libro de Laozi, aŭ pri La Laozi. Ĉi tio eblas, ĉar la Maljuna Majstro (“lao zi” signifas tion ĉi) verkis, aŭ pli bone dirite: “diktis”, nur unu libron, en kiun li enmetis sian tutan saĝon.

La malfacilon traduki la titolon de Dao De Jing, Ētiemble (eble la

plej fama franca ĉinologo) klarigas jene:

“Laŭ la ĉina sintakso, la tri vortoj kiuj ĝin konsistigas povas konstruiĝi laŭ du manieroj:

— ‘tao’ [dao] kaj ‘tö’ [de] estas sur la sama logika ebena, kaj komplementoj determinaj de la vorto ‘king’ [jing];

— ‘tao’ [dao] estas determina komplemento de ‘tö’ [de], kiu ĉi siavice estas determina komplemento de ‘king’ [jing].

Laŭ adopto de la unua aŭ de la alia hipotezo, same korekta la unua kiel la alia el gramatika vidpunkto, oni do ekhavas:

— la ‘king’ [jing] de la ‘tao’ [dao] kaj de la ‘tö’ [de], aŭ

— la ‘king’ [jing] de la ‘tö’ [de] de la ‘tao’ [dao].

Tio ĉi, eĉ sen ajna scipovo de la ĉina, povas signifi, evidente, nur du ideojn ege malsamajn”.

Se ni do tradukus ‘jing’-on per ‘klasikaĵo; ‘de’-on, per ‘virton’ kaj ‘dao’-on, per “vojo”, ni havus du eblajn titolojn por la libro de Laozi: Klasikaĵo pri la Vojo kaj la Virto, kaj Klasikaĵo pri la Virto de la Vojo. WANG Chongfang hezite proponas la esperantan titolon: Klasikaĵo pri la Taŭo kaj Ĝia Virto, sed uzadas nur la tradician ĉinan titolon: Dao De Jing, pro la nedifineblo de la vortoj ‘dao’ kaj ‘de’. Mi faru do same!

Sed kial la bele prezentita esperantigo de Dao De Jing estas tiel dika, 419-paĝa? Nu, tial ke ĝi estas kompleta verkaĵo por ĉiuj, eĉ por erudiciuloj. La plejparto de la tradukaĵoj de filozofiaj klasikaĵoj estas dulingvaj; tio ĉi estas nepra kondiĉo de ilia erudicia uzebleco. Kaze de la tre arkaika teksto de Dao De Jing, du lingvoj ne sufiĉas, ĉar la originala teksto estas verkita en lingvo fakte malsimila al la klasika




mandarena lingvo, kaj ne estas komprenebla sen antaŭa studado. En la tradukaĵo de WANG Chongfang, ni do trovas tri skribitajn lingvojn: la esperantan, la originalan (kiu sekvas la tekston establitajn de WANG Bi dum regado de la Wei-dinastio (220 – 265 pK) kaj la mandarenan.

Pro mia nescio de la ĉina, mi ne estas fake kompetenta por recenzi la tradukaĵon de WANG Chongfang; tamen mi havas kun Dao De Jing pli ol kvindek-jaran spiritan kontakton: kontakton de amato, de homo, kiu amas tiun ĉi saĝo-tekston, kiu ĝin legadas, ĝin pridiskutadas kun siaj intimuloj, kiu petas de ĝi konsilajn por sia ĉiutaga vivo. Koncepte, mi ja havas sufiĉe solidan kaj tre belan ‘idolon’ de Dao De Jing en mia menso. Mi povas nur kompari la esperantan version tra WANG Chongfang al tiu ĉi koncepta mensobildo.

Mi ekridetas legante la unuan piednoton, sub la unua ĉapitro, de la ĉina erudiciulo:

“Mi preferas la formon ‘Taŭo’ al ‘Tao’, kvankam la dua estas akceptita de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, ĉar la unua formo estas fonetike pli proksima al la ĉina vorto ‘dao’. Se mi prenis la formon ‘Tao’, laŭ la Esperanta gramatiko ĝia radiko devus esti ‘Ta-’ kaj ‘-o’



estus ĝia finaĵo, tio evidente ne estus preferinda. (p. 61)

Evidente... tio ĉi memorigas al mi mian ŝokiĝon, kiam mi vidis aperon de kripligitaj radikoj en PIV, kaj pruvas, jam antaŭ la legado de lia libro, la seriozecon de la erudiciulo WANG Chongfang. La internacia radiko evidente ne estas “ta”, sed “tao”. Kian kompreneblan internaciecon povus havi la vortojn “taa”, “taisto”, “taismo”, “taeco”? Cetere, PIV ne kuraĝas listigi ilin; ĝi listigas “taoisto”-n kaj “taoismo”-n devenintaj de “Tao/o”. Se do la erara formo “Ta/o” ne malaperas en la fama vortaro, ni sekvu la ĉinan erudiciulon, kaj havu “taŭismo”-on, “taŭisto”-on kaj “taŭa”-on, kiuj, kvankam malhavante internaciecon, estas almenaŭ logikaj. Eble ne tro ĝenos, ke “taŭo” estas ankaŭ la nomo de la 19a litero de la greka alfabeto, tre uzata ankaŭ en sciencoj.

Dum mia plenkreskula vivo, mi ofte estis devigata ripeti maksimumon de Dao De Jing, venantan el la franca traduko farita de J.-J.-L. Duyvendak: “savoir qu’assez est assez est avoir toujours assez”, kies laŭvorta esperantigo estas: “scii ke

sufiĉe estas sufiĉe, estas ĉiam havi sufiĉe”. Mi memoras pri mia ridanta edzino, kiu ĝin citis svingante 100-graman ladskatolon da moruo. Tiu ĉi maksimumo troviĝas en la 46a ĉapitro de Dao De Jing. Mi do elektis tre subjektive tiun ĉi ĉapitron por iel taksi, per komparo al du franclingvaj kaj unu hungarlingva tradukaĵoj, la rezulton de la traduklaboro de WANG Chongfang.

Jen do, kiel eble plej laŭvorta esperantigo de tiu 46a ĉapitro el la franca de J.-J.-L. Duyvendak:

“Kiam la imperio posedas la Vojon,

oni eljungas la rajdĉevalojn por (havi)ilian sterkon.

Kiam la imperio ne posedas la vojon,

oni bredas la batalĉevalojn en la antaŭurboj.

Ne ekzistas pli granda eraro ol aprobi la dezirojn.

Ne ekzistas pli granda malfeliĉo ol ne scipovi havi sufiĉe.

Ne ekzistas pli granda kulpo ol la deziro akiri.

Ĉar scii ke sufiĉe estas sufiĉe, estas ĉiam havi sufiĉe. (p. 111)

La sama 46a ĉapitro, el la franca de Liou Kia-Hway4:

“Se la mondo estas sur bona vojo, oni eljungas la rajdĉevalojn por sterkadi la agrojn.

Se la mondo ne estas sur la bona vojo,

la batalĉevaloj pululas en la antaŭurboj.

Ne ekzistas pli granda krimo ol aprobi siajn dezirojn.

Ne ekzistas pli granda malfeliĉo ol ne scipovi kontentiĝi.

Ne ekzistas pli granda eraro ol voli ĉiam akiradi.

Tiel, kiu scipovas kontentiĝi, tiu estas ĉiam kontenta.” (p. 49)

Mia preferata versio pro la beleco de poezia lingvaĵo estas la hungara de Weöres SANDOR surbaze de la proza tradukaĵo de TÓKEI Ferenc:

“kiam subĉiele ekzistas la vojo:
la ĉevaloj sterkadas la teron;
kiam subĉiele forestas la vojo:
sur la kampoj paŝtiĝas batalstalonoj.

Ne estas pli granda sortobato, ol la sufiĉon ne koni,
ankaŭ ne pli granda danĝero, ol la klopodo akiri.

Tial:

Tiu kiu kontentiĝas per la sufiĉa, nepras nomi kontenta.”(el hungarlingva PDF-aĵo reta)

Ni retrovas tiun saman 46-an ĉapitron en la libro de WANG Chongfang jene:

“Kiam la mondo estas regata laŭ la Taŭo,

La militĉevaloj estas uzataj en terkulturado.

Kiam la mondo estas regata kontraŭ la Taŭo,

Eĉ gravedaj ĉevalinoj estas uzataj sur batalkampoj.

Nenia malfeliĉo estas pli granda ol la malkontenteco;

Nenia kulpo estas pli granda ol la nesatigebla avido.

Tial tiu, kiu estas kontenta pri sia kontenteco,

Ĉiam estas kontentigita.” (p. 250)

Ĉu ne mirigas vin la senca simileco inter la kvar tradukaĵoj post traĵo de tri lingvoj? Nu, estas tiel nur ĉar mi elektis la universitate garantiitajn; estas multaj aliaj, kiuj paroli ne valoras la tempoperdon. Se vi komparas ĉiujn ĉapitrojn de tiuj ĉi kvar tradukaĵoj, ankaŭ vi konvinkiĝus, ke la versio de WANG Chongfang egalas, eĉ superas, la plej seriozajn eŭropajn versiojn. Eĉ superas, ĉu? Nu, jes. Konsideru la verson: “Eĉ gravedaj ĉevalinoj estas uzataj sur batalkampoj”! Malfacile estas kredi, ke la esprimo “gravedaj ĉevalinoj” ne troviĝas en la originalo. Tamen la eŭropaj tradukoj ne redonas ĝin. WANG Chongfang ne parolas en sia piedpaĝa komento pri “gravedaj ĉevalinoj”, kion li certe farus se temus pri tropro inventita de li. Li ankaŭ ne klarigas pri la foresto de “sterk-”, kiu tamen enestas la eŭropajn tradukojn. Jen lia piednota komento de la 46a:

“[Komento] La unuaj du frazoj de tiu ĉi ĉapitro prezentas akran kontraston inter la sekvoj de la paco kaj la milito. Laŭ Laŭzi la kaŭzo de la milito estas la homaj nekontenteco kaj avido, kaj tial li deadmonas nin de nesatigebla avido.” (p. 250)

La versio de Liou Kia-Hway ne komentas la 46-an ĉapitron; la poezia versio de Weöres SANDOR ne havas piednotojn, kaj mi ne konas la prozan version de TÓKEI Ferenc, surbaze de kiu ĝi estis farita. Sed la komento de la 46-a ĉapitro de Duyvendak alportas utilajn



Alvoko de IKEF-prezidanto Ĉielismo WANG Tianyi

Karaj IKEFanoj,

Jam pasis la 10-a Jarkunveno de IKEF-Ĉinio kadre de 8-a Azia Kongreso de Esperanto en Quanzhou de la suda Ĉinio. Jen legu alpendan foton memore al la kunveno.

La 10an Jarkunvenon partoprenis ĉ. 40 personoj inkluzive ne-IKEFanojn sed kongresanojn. Okaze kelkaj aktivuloj prelegis siajn raportojn pri komercaj agadoj per Esperanto, kaj IKEF-Koreio montris siajn varojn kaj varme invitas aliĝon al a komuna konferenco de IKEF okaze de UK 2017 Seulo! Menciinde

Veronika POOR, nova Ĝenerala Direktorino de UEA ankaŭ ĉeestis nian kunvenon kaj varme diskutis kun IKEFanoj pri grava signifo de fakaj agadoj per Esperanto. Rezulte, okaze de la kongresa forumo nome de IKEFanoj s-ro KIM prezidanto de IKEF-Koreio faris tre varman paroladon kaj refojan invitadon al la 1a komuna konferenco de IKEF okaze de 2017 en Seulo!

Jes, mi opinias ke la 1a komuna konferenco de IKEF havos historian signifon por evoluigo de Esperanto. Mi alvokas ĉiujn IKEFanojn

propagandi ĝin okaze de siaj E-aranĝoj kaj landaj kongresoj, eĉ proponi al siaj konataj entreprenistoj kune partopreni la komunan konferencon de IKEF okaze de la 102-a UK 2017 en Seulo! Precipe IKEF-landaj filioj devas komencian preparon por la 1-a komuna konferenco de IKEF. Por havi koncernajn detalojn kontaktu ĉe IKEF-Koreio: kara12345@gmail.com.

Pligrandan sukceson de IKEF!
Amike via
Ĉielismo, Prezidanto de IKEF



P16 indikaĵojn. Ni legu ĝin tute, ĉar ĝi sentigas la problemaron ĉirkaŭantan la tradukon de ĉiuj frazoj de Dao De Jing.

“Por la karaktero ‘kiue’ (‘repuŝi’), mi adoptas la hipotezon de KAO Heng kaj legas ‘sie’ (‘eljungi’), kiu estas tre simila kaj ŝajnas doni secon pli kontentigan.

En malnova citaĵo de tiu ĉi teksto, farita de TĤANG Heng (78 – 139), la vorto “sterko” estas sekvata de la vorto “ĉaro” kaj oni provis interpreti la frazon jene: “La rajdĉevaloj estas forsenditaj por esti uzataj al jungado antaŭ sterkoĉarojn.” Filologie kaj historie, tiu ĉi interpreto ne kontentigas min. Envere, la ideo ŝajnas al mi tiu ĉi: la batalĉevaloj, tio estas la rajdĉevaloj rapidaj uzataj en milito por tiri la batalĉarojn, estas eljunigitaj, tial ke ne plu estas milito, kaj la nura kozo kiu plu interesas ĉe tiuj ĉi belegaj bestoj, estas ilia sterko, kiun oni povas utiligadi kiel sterkaĵon

en la agroj. Nure, mi ne certas, ke la ĉinoj, en tiu epoko, estis jam uzantaj sterkajon. Por pridiskutado, vidi en Kin-ling hiue-pao, Nanking JOURNAL, V. 2 (novembro 1935a), paĝoj 259 - 260. En la dua frazo, la penso disvolviĝas en la mala direkto: kiam oni ne posedas La Vojon, oni pensas nur pri la milito, kaj la rajdĉevaloj estas bredataj eĉ en la antaŭurboj, tio estas en la sanktigita regiono kie troviĝas la ofertumuloj por Ĉielo kaj Tero. La frazo: “Ne ekzistas pli granda eraro ol aprobi la dezirojn”, kiu forestas en la teksto de WANG Pi, estas enportita por kompletigo laŭ Han-fei-tseu kaj Ho-chang-kong. Anstataŭ “deziro akiri”, oni povus traduki per inversio “akiri siajn dezirojn”.

Kompari kun la lasta paragrafo la frazon el la ĉapitro 33-a: “Tiu kiu scipovas sin kontentigi (havi sufiĉe) estas riĉa” [Ĉe WANG Chongfang: “Tiu, kiu estas kontenta, estas riĉa”]. Kaj el la 44a: Tiu, kiu scipovas

kontentigi (havi sufiĉe) ne estos konfuzita” [Ĉe WANG Chongfang: “Tiu, kiu estas kontenta, renkontas nenian malhonoron”].

Mi mem alvenis al la konkludo (leginte historilibrojn, kiel La ĉina mondo⁷ de Jacques GERNER kaj aliajn), ke la ĉevalsterkaĵo ne estis uzata por fekundigi la agrojn ĉinajn dum la epoko de la verkado de Dao De Jing, do, ke WANG Chongfang pravis forigante la radikon “sterk-” el sia tradukaĵo. Mi nenion trovis pri “gravedaj ĉevalinoj”, tamen la tropo estas tiel ĝusta, tiel kortuŝa, tiel kuntaŭga kun la kunteksto, ke — laŭ mia sento — ankaŭ tie WANG Chongfang probable pravas. La 46-a ĉapitro de Dao De Jing ne estas aparte grava, aŭ pli grava ol la aliaj, sed ĝia longeta analizo espereble konvinkis vin pri la nepro relegi La Laozi-on en la esperanta versio de Majstro WANG.

el La Gazeto, n-ro 166, majo 2013


Verko de Nobel-premiito MO Yan

Rano

■ *Xie Yuming*

Granda kontribuo de tiu ĉi traduko, farita fidele kaj subtile en la aĝo de 69 jaroj, kuŝas en tio, ke niaj samideanoj, ne regantaj la ĉinan lingvon, havu la ŝancon ne nur spirite proksimiĝi al la verkisto (eble eĉ vidi lian modestan figuron kaj iom babili kun li aŭ en kolokvo, simpozio, konferenco pri tiu ĉi traduko kaj aliaj de liaj romanoj aŭ post lia eklerno de la internacia lingvo), sed ankaŭ persone koni la nunan Ĉinion, ĉerke traŭmatizitan en la vandalismaj jaroj kaj admirinde renovigitan dank' al la reformado kaj malfermo, kondukataj de la granda, glora Komunista Partio de Ĉinio.

La tradukinto, estimata sinjoro WANG Shirong, estas kompetenta veterano, ekde la juneco sin dediĉanta al Esperanto. Ĉi-foje, kiel antaŭe, li riĉigis nian lingvon per elvokivaj esprimoj, ekzemple CHEN Nazo, WANG Piedo kaj WU Intesto; “generala ventro” (p. 93), “Trio da ĉevaloj ne povas retiri lin” (p. 95), “sovaĝa floro” (p. 216), “ranido” (p. 216), “Venas saĝo el damaĝo”



(p. 248), “kiel fiŝo en potoj” (p. 331); ni havas jam la malsamsignifajn esprimojn “kiel fiŝo en akvo” kaj “kiel fiŝo ekster la akvo” en PIV). Ankaŭ per iuj novaj vortoj – legiĝas, en la sepa paĝo, kvazaŭa neologismo “periodontito”, kiu konsistas el “peri~” (ĉirkaŭ), “odont(o)~” (dento) kaj “~it~” (inflamo); “mantoo” (p. 29), “rehmanio” (p. 38), ĝaŭzio (p. 177), bovrano (p. 184) kaj halioto (p. 241).

La traduko estas ege subtila dank' al tio, ke sinjoro WANG Shirong preterlasis neniun detalon, eĉ ne iun ajn apenaŭ rimarkeblan, donante sufiĉe multajn klarigojn, tiel ke niaj samideanoj povas facile kompreni la ampleksan kaj profundan enhavon de la romano. Regas ankaŭ flueco kaj simpla el tio, ke la tradukinto artisme lirligis kaj malkomplicis la frazojn anstataŭ kompleksigi ilin per reto da subpropozicioj.

Jen heroino, la romana, ankaŭ epoka, nomata WAN Koro, naskita en 1937, diplomita el medicina lernejo en 1953 kaj fariĝinta ginekolog-obstetrikistino kiu faradis akuŝigojn ne nur al dekmiloj da virinoj, sed ankaŭ, foje, al bovino.

Kio okazis inter WAN Koro kaj la japana komandanto Sugitani? Bonvole legu la romanon! Sekve Ranido rakontas, kiel WAN Koro, kvazaŭ metempsikozito de Bakho aŭ Dionizo, tiel ebrigiis la kadrobastardojn, ke ili sinkis sub tablon kaj jen bojis jen hojlis, jen bekis jen lekis... Bonvole legu la tradukon, se vi volas scii, kion WAN Koro forjetis kiel ranon!

“Ĉe stomako malsata ne kapricas palato”, la zamenhofan proverbon oni rememoras, legante kortuŝan rakonton pri la ĉiutaga vivo de kamparanoj, kiuj produktadis grenojn tamen baraktadis en malsatego. Jam ambroziis eĉ karbo,



MO Yan, aŭtoro de la libro, Literatura Nobel-premiito

herbo, cikado, cimo, formiko kaj... Kiel ili rongis antraciton, maĉis tigon kaj ĝuis nutrecon el insekto en la paŭperismaj jaroj, en kiuj plaĉis eĉ blato al la palato, se ne paroli pri rato? Kaj batato? Ho ve, kion batato alportis? Bonvole legu plu!

Oni eksplodos per rido aŭ snufe ploros, rigarde tuŝante la paĝojn pri tio, ke batato kondukis al tumulto, kaose furiozanta kontraŭ kondoma distribuado kaj spermodukta ligaturado en la granda famiplanada movado.

Monde konatas la Kultura Revolucio, huladinta kaj hurladinta en la daŭro de 1966 ĝis 1976 post ies forlaso. Kiom da jardekoj oni povas teni en la tuta vivo? Sed ĉu kultura revolucio aŭ brutula raborabio? Mem juĝu bonvole, laŭ aŭtenta kaj konkreta priskribado en tiu ĉi verko de MO Yan, kiu ne senkaŭze ricevis la literaturan Nobel-premion!

Ĉu vi interesiĝas pri amuza kverelo kaj militeca lukto inter “Duonfeo” Yuan Vango, kiu bombaste aŭdigis en festeno longan analizon pri dispozicia geomancio, kaj Hao Manego havanta tiel lertajn fingrojn, ke li kapablis modli en momento pupon faksimilan al kliento? Ĉu vi volas scii, kiel WAN Koro faris kontraŭkoncipan enuteran rimedon al la edzino de sia nevo sen

ILEI sukcese organizis KER-ekzamenojn en Ĉinio

La 5-an de novembro 2016 dum la Azia Kongreso de Esperanto, ILEI sukcese organizis KER-ekzamenojn kun 23 aliĝintoj inkluzive de 21 ĉinoj, 1 filipino, 1 Irano. El ili 9 aliĝis por la nivelo C1 (8 partoprenis), 3 por B2, 11 por B1 (10 partoprenis). La kvanto de ekzamenantoj por C1 estas la plej multaj en la ekzamena historio de Ĉinio. Laŭ la raporto de profesoro GONG Xiaofeng (Arko), vicprezidantino de ILEI kaj ĉina sekciestro de ILEI, Ĉinio organizis kvin KER-ekzamenojn. La unua ekzameno okazis en la 7-a de februaro 2012 en Esperanto-Insulo en Hainano. La dua okazis en la 16-a de novembro en Zaozhuang Universitato dum la 10-a Esperanto-Kongreso de Ĉinio. En 2014 okazis du ekzamenoj en Zhaozhuang kaj Tianjing. Ĝis antaŭ la ĉifoj ekzameno la KER-ekzamenon sukcese trapasis 9 esperantistoj por la nivelo C1, kaj 9 por B2, 34 por B1. (Arko)



P20

peti ŝian konsenton kaj kio okazis al la juna akuŝintino? Sed kio sekvis, post kiam Yuan Vango laŭpete elpinĉis la enuteran ringon, la edzino de Ranido denove gravediĝis, Wan Koro devige faris abortigon kaj tia operacio sendis, parce aŭ fortune, la “ranidino” kaj “raneteton” en ĉielan palacon (Tamen kiel nia Majstro diris, “rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo”, se ne paroli pri la ino kaj ido de Ranido!)? Ĉu vi inklinas mense spekti grandiozan festenon en la hejmpalaco de Ranido?

Ĉio reaperis, ĉio detruita aŭ ruinigita en la jaroj de la kultura polucio (ve al mi, sed “revolucio!”), escepte de miriado da mortigitoj kaj suicidintoj; fakte ankaŭ ili kiuj, reaperantoj (eble eĉ la Ibsenaj?), ofte frapis je la mensa pordo de iuj rimorsantoj, eĉ de la firmavola Wan Koro, kiu poste povis fari nenion alian ol taski al la edzo, ke li modlu pupojn, laŭ ŝia rememorado similajn al fetoj aŭ beboj kiujn ŝi, por plenumi la grandan politikon, propramane pereigis en abortigo kaj

kies naskotagoj stampiĝis al ŝi en la cerbo!); restariĝis eĉ la Templo de Infandona Diino kun senprecedentaj majesteco, impono kaj lukso kompare kun antaŭa templo. Ĉio reveninta aŭ reanimita havas multe pli grandan potencon, disvastiĝas ĉien kaj penetras tra la 4 dimensioj, preskaŭ tra la tuta Galaksio. Sed...

Sed ni revenu al la heroino kiu, timanta nenion kaj nenion, svenis terurite de rano. Kial? Tamen ĝuste la Rano kaj marĉo da ĝiaj gefratoj portis ŝin al la sino de Hao Manego kiu feliĉe aŭdis ŝiajn unuajn vortojn: “Ni geedziĝu!”... Bonvole legu la eminentan tradukon!

Bonvolu legi plu! Kio estas naskosurogato? Akrobataje paralelis la surogatado kaj familia planado kiu lasta lerte fariĝis mongajniga labirinto por iuj nobluloj.

Fine! Fine la fikcirealan romanon kronas 9-akta dramo, speciale verkita de la Nobel-premiito kaj titolita “Rano”! Ni do ludu ĝin, ĉu bone? Sed kiun rolon vi preferas? Aŭ ni kune estu spektantoj en Esperanto-teatro, tronanta en...

*redaktoro de Chenjie
el EPC*



Prelega Vojaĝo per Esperanto en Tianjin

Matene de la 23a de oktobro en Yunneng-halo de Nankai-Universitato, Tianjin okazis la prelega Vojaĝo per Esperanto, kiun organizis Esperanto-asocioj de Tianjin kaj Pekino kaj Moderna Teleeduka Kolegio. Samtempe okazis la kunveno por diskonigo de nedeviga kurso de Esperanto en la kolegio.

S-ino ZHANG Ping el Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia faris la prelegon, kiun ĉeestis pli ol 30 homoj, inkluzive de s-ro Rafael Henrique ZERBETTO el El Popola Ĉinio, s-ino Susanna BAGHDASARYAN el Armenio, esperantistoj el Tianjin kaj Pekino kaj studentoj el Nankai-Universitato kaj Tianjin-a Fremdlingva Universitato.

Post la prelego, Esperanto eniros Nankai-Universitaton kaj fariĝos ĝia



nedeviga kurso. Oni povas diri, ke Esperanto revenos al la universitato, ĉar ĝi estas la unua universitato en Tianjin, kiu enkondukis Esperanton kaj establis Esperanto-asocion. Estas

atendeble, ke pli da studentoj aliĝos al la esperantistaro, kaj pli da homoj ekkonos Esperanton, subtenos Esperanton, lernos Esperanton kaj eĉ vojaĝos per Esperanto. *HAN Zuwu*

Koreaj kaj japanaj samideanoj vizitis Esperanto-Arbaron en Zaozhuang

La 7an de oktobro Koreaj samideanoj BAK Giwan kaj KIM Jungmi kune kun japanaj samideanoj Sasaki TERUHIRO kaj Sato RYUSUKE, kiuj servas kiel instruistoj en la Zaozhuang-a Universitato, vizitis Esperanto-Arbaron de Zaozhuang, urbo de la provinco Shandong en orienta Ĉinio. Lokaj esperantistoj akompanis ilin dum la vizito en la arbaro.

La arbaro troviĝas en iu familia farmobieno, kies posedanto estas esperantisto. Li planas konstrui Arbaro-Parkon kun la Esperanta kulturo ĉi tie, kaj nun lia plano estas en kontrolado de la loka registaro. Dum la vizito, trilandaj samideanoj kune ĝuis ne nur la naturan pejzaĝon en la arbaro, sed ankaŭ kamparajn manĝaĵojn bongustajn en la farmobieno. *SUN Mingxiao*



La 31-jariĝo de la Dandong-a Esperanto-Asocio

La 9-an de julio okazis celebrado de la 31-jariĝo de la Dandong-a Esperanto-Asocio kaj de la 129-jariĝo de Esperanto en la urbo Dandong, nordorienta Ĉinio. Dandong-aj esperantistoj kunvenis sub la temo "Espero, justeco kaj amo".

Ekde la naskiĝo de Esperanto, daŭras pli ol jarcenton la marŝo al egaleco, harmonio kaj reciproka

respekto inter la homoj. Nun esperantistoj distribuiĝas sur la tuta terĝlobo. Kvankam ne multaj homoj ankoraŭ uzas la Internacian Lingvon, tamen dank' al la 30-jara klopodo de lokaj esperantistoj la asocio en la urbo Dandong kreskas: en 1986 kursoj de Esperanto komenciĝis en elementaj, mezaj kaj superaj lernejoj; en 1987 la asocio kondukis elementlernejanon partopreni en la 71-a UK; en 1992 dandong-aj

esperantistoj ĉeestis al la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto; en 2013 la kvaropa delegacio de la asocio partoprenis en la Korea Kongreso de Esperanto.

La asocio jam sukcese okazigis la 1-an kaj la 6-an Esperanto-Kongresojn de Nordorienta Ĉinio kaj Interna Mongolio, kaj akceptis esperantistojn el diversaj landoj kaj regionoj. Ĝi plenforte disvastigas Esperanton kaj celas semi verdan stelon ĉie.

En 2018 okazos la 10-a Esperanta Kongreso de Nordorienta Ĉinio kaj Interna Mongolio en la urbo. Dandong-aj esperantistoj faros sian kontribuon por la E-movado en Ĉinio celante pligrandigi la verdan aferon.

En la celebra kunveno oni faris prezentadon kaj legis la bondezirojn senditajn de la Esperanto-Asocio de la provinco Liaoning, la Dandong-a Federacio de Soci-sciencaj Rondoj, konata esperantisto ZHAO Jianping (de ĈRI) kaj aliaj E-asocioj aŭ esperantistoj. *XIE Ruifeng de EPC*



Esperanto-forumo okazis en Hangzhou Ĉinio

En la 9a de Septembro 2016, en la bela urbo Hangzhou okazis Esperanto-forumo de Ŝanhajo kaj provincoj Zhejiang, Jiangsu, Henan kaj Shanxi. En ĝi partoprenis ĉirkaŭ 200 esperantistoj.

En la forumo, ĉirkaŭ la temo "Servu per Esperanto al konstruado de 'La Zono kaj Vojo'", brilajn prelegojn faris s-ro WANG Minhao, prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio, kaj s-ro WANG Tianyi, prezidanto de Xi'an-a Esperanto-Asocio, kiuj altigis la koncepton de partoprenantoj pri servo per Esperanto al disvolvo de Ĉinio kaj akcelo de ĝia ekonomia konstruo de "La Zono kaj Vojo". Dum la forumo, la partoprenantoj ne nur ĝuis la artan festivalon el 15 kulturaj programeroj, ĉiu kun Esperantaj elementoj prezentitaj de artgrupoj el la supre menciitaj kvin lokoj, sed ankaŭ kune vizitis la Muzeon

de Granda Kanalo inter Pekino kaj Hangzhou kaj tiun de Okcidenta Lago kaj aliajn mondajn kulturajn heredaĵojn.

La dutaga forumo multe laŭdata de la partoprenantoj plivastigis la

uzon de Esperanto kaj liveris valoran sperton por estontaj interŝanĝoj inter ĉinaj kaj alilandaj Esperanto-organizoj kaj individuoj.

WANG Minhao



Ŝanhaja Esperanto-Asocio okazigis la jarkunvenon de 2016

La 12-an de novembro la Ŝanhaja Esperanto-Asocio okazigis la jarkunvenon de 2016. ZHOU Tianhao, vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de la asocio, prezidis la kunvenon, en kiu partoprenis pli ol 20 membroj de la asocio.

En la kunveno WANG Minhao, prezidanto de la asocio, faris prelegon kun la titolo "Per Esperanto antaŭenigi interŝanĝojn inter popoloj kaj servi al la konstruado de 'La Zono kaj Vojo'". JIANG Xiaofeng kaj LI Like, membroj de la konsilantaro de la asocio, parolis respektive ĉirkaŭ la temo "Esperanto -- ponto al 'La Zono kaj Vojo'" kaj "Mia tria Azia Kongreso de Esperanto". Saed ABBASI, irana samideano laboranta en Ŝanhajo, prelegis kun la titolo "La pozicio kaj rolo de Irano sur la Silka Vojo".

En sia prelego WANG Minhao priskribis la neanstataŭigeblan rolon de Esperanto en kultura, turisma, komerca kaj akademia interŝanĝoj inter malsamaj landoj kaj nacioj en 130 jaroj post la naskiĝo de la lingvo. Li alvokis, ke la ĉinaj esperantistoj fortigu interŝanĝon kaj kunlaboron kun esperantistoj de la landoj ĉe "La Zono kaj Vojo", senĉese fortigu la



funkcion de Esperanto en internaciaj interŝanĝoj kaj kontribuu por la konstruo de "La Zono kaj Vojo". La irana samideano Saed ABBASI diris, ke li esperas aktive partopreni en la konstruo de "La Zono kaj Vojo" kaj

kune kun esperantistoj kaj popoloj de diversaj landoj ĉe "La Zono kaj Vojo" efektiviĝi interŝanĝojn kaj kunlaboron en diversaj kampoj kaj fari kontribuon al la konstruo de "La Zono kaj Vojo." *WANG Minhao*

Okazis jarkunveno de la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio

La 27-an de novembro okazis la jarkunveno de la Esperanto-Asocio de Interna Mongolio. XIAO Ke, prezidanto de la konsilantaro de la asocio, faris raporton pri la laboroj en 2016, WANG Zhiyi, MA Jianmin kaj ZHANG Jianjun, vicprezidantoj de la asocio, kaj BAI Risheng, ĝia ĝenerala sekretario, prezentis siajn proponojn pri laboroj en 2017.

Sinjorinoj KANG Li, nove elektita vicprezidanto, kaj konsiliano LIANG Lina, per PPT, raportis pri la 8-a Azia Kongreso de Esperanto okazinta en Quanzhou de Ĉinio. En la kunveno oni decidis, ke, ekde 2017, ĉiu-jare la asocio monsubtenos 1-2 studentojn por ilia partopreno en enlanda kaj internacia kongresoj de Esperanto. *XIE Rui Feng de EPC ĉe espero.com.cn*



Pekina Esperanto-Asocio okazigis E-seminaron

la 26-an de novembro okazis en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato E-seminario kadre de la Akademia Forumo organizita de la Pekina E-Asocio(PEA).

La prelegantoj de la seminario donis prelegon laŭ la ĉeftemo "Interreto plus Esperanto-Verda Ligilo", fiksante sian propran, pli precizan titolon.

En la unua prelego prof. ZHOU Liuxi(de la Pekina Lingva Instruista Universitato) pere de siaj precizaj datumoj pri la disertacioj kaj tezoj rilataj al la Internacia Lingvo, alte taksis la disvolvodon de E-movado en la nuna socio. Li diris, ke en la literatura rondo dank' al la apartaj trajtoj de nia internacia lingvo kaj la ĉinaj lingvo, "ĉinesko"(formo de la ĉina poezio) en Esperanto helpas al ni ankaŭ en tradukado en aliajn etnajn lingvojn.

La prelego de s-ino YU Jianchao (el la Ĉina Radio Internacia) estis same atentkapta. Ŝi unue konigis al la ĉeestantoj la internacian Esperanto-Sumoon iniciatitan de la



japana esperantisto Hori JASUO, kaj sekve montris la fakton, laŭ la statistiko kunlabore akirita de ŝi kaj sinjoro Hori, ke la aktivado dum 7-a jara praktikado ne nur jam elvokis eĥojn el la tuta mondo kaj ricevis subtenon de ILEI, sed ankaŭ formis

sian propran kulturon, kiu atestas la aperon de "komunumo de la Esperanta kulturo".

S-ino ZHANG Ping(el la Ĉina Radio Internacia) faris alian interesan prelegon, ŝi parolis pri sia sperto organizi enketadon per interkonaj retejoj inter diverslandaj esperantistoj, kaj asertis ke la kreiveco de junuloj povos helpi al esperantistoj transsalti la baron de diversaj kampoj kaj disciplinoj kaj konstrui amikan rondon malgraŭ diferencoj. Ankaŭ s-ro ZHENG Bocheng, WANG Yujin, YE Nianxian kaj LI Jianhua respektive prezentis prelegojn koncernajn al la ĉeftemo.

Posttagmeze okazis la 7-a kongreso de PEA. En ĝi membroj de la asocio aŭskultis la resuman laborraporton de s-ro NAN Youli, eksa prezidanto de PEA kaj voĉdone elektis la novan estraron. S-ino YU Jianchao estis elektita kiel la nova prezidanto kaj elektigis kiel la vicprezidantoj, s-ino CHEN Ji, s-roj JIANG Limin, WANG Yujin kaj XIAO Huoli, kaj s-ro ZHANG Yongle kiel ĝenerala sekretario.

laŭ video de EPC ĉe espero.com.cn



Esperanto en Ĉinio

■ *Liu Xiaozhe(Solis)**

La Esperanta movado en Ĉinio estas grava parto de tiu en la mondo. Sed oni troigas ĝian skalon.


Laŭ takso, nun en Ĉinio estas malpli ol 1000 homoj, kiuj povas paroli Esperanton en diversaj niveloj. Sciu, ke en Ĉinio estas pli ol 1406 milionoj da loĝantoj, nome estas nur 1 parolanto de Esperanto el miliono da ĉinoj!

Esperanto estis enkondukita al en Ĉinio ĉirkaŭ la jaro 1900. Ĝis nun (jaro 2016), esperanto du foje prosperis en Ĉinio.

La unua fojo okazis ĉirkaŭ 1912–1936, kiam ĉinaj intelektantoj komencis akcepti eŭropajn penson kaj kulturon. La tiama ministro de la Edukado, sinjoro Cai Yuanpei, kaj multaj aliaj famaj intelektuloj varme subtenis Esperanton. La dua fojo okazis ĉirkaŭ 1981–2005, kiam la ĉina registaro komencis ŝanĝi sian ŝtatan izolecon. La popolo, katenita de la komunismo de pli ol 30 jaroj, montris grandajn interesojn al la ekstera mondo. Ili komencis lerni la fremdajn lingvojn, inkluzive Esperanton, por lerni avangardajn sciencon kaj teknikon de alilandoj, ĉefe de Usono kaj Eŭropo. Laŭdire,



Poŝtmarko memorante centjariĝon de Esperanto, emisiita de ĉina registaro



Liu Xiaozhe(Solis)

tiam la lernantoj de esperanto superas 800 mil.

Bedaŭrinde, malmultaj floroj fruktis.

Por ĉinoj, fakte Esperanto ne estas tiel facila kiel la subtenantoj propagandas. Ne kapable posedinte la lingvon, plejparto de la lernantoj foriris de Esperanto. Mi okazigis kelkajn kursojn en universitatoj en Urumqi, la ĉefurbo de la regiono Xinjiang, sed nur 1 kursano esperantistiĝis.

En jaro 1978, ĉina komunisto partio komencis ekonomian reformigon, kio altigas la vivan nivelon de la popolo. Sed la partio ne volas ŝanĝon je la politiko, do ĝi kondukas la intereson de popolo al la ekonomia profito. La troa ĉasado al la mono rezultas, ke ĉinoj perdas la aspiron al la idealo kaj spirito. Tial multaj homoj perdis la intereson al

Esperanto, kiu ne povas alporti al si ekonomian efikecon. Do restas en la Esperanta grupo nur malmultaj fieraj kaj fidelaj parolantoj kaj subtenantoj.

La interreto alportas ŝancon kaj rimedon al ĉinaj esperantistoj. Per la reto, oni povas prezenti kaj instrui Esperanton al la publiko per malmulta kosto. En ĉina esperantujo aperas junaj vizaĝoj, kiuj povas bone paroli la lingvon post lernado en la reto. Uzante la reton, la parolantoj povas apliki facile la lingvon kun alilandaj esperantistoj, kio montras la valoron de Esperanto.

Krome, en elementaj lernejoj kaj universitatoj oni okazigas esperantajn kursojn, en kiuj estas multaj lernantoj. Sed la efika rimedo ankoraŭ estas serĉata, per kiu oni povas fari la lernantojn parolantoj post la finiĝo de la kursoj.

Esperanto-Retejoj en Ĉinio

El Popola Ĉinio: <http://espero.com.cn>

Ĉina Radio Internacia: <http://esperanto.cri.cn>

Esperanto-Muzeo: <http://e-muzeo.com>

Lernado de Esperanto: <http://elerno.cn>

Verda Reto: <http://reto.cn>

Budhana Reto Esperantista: <http://budhano.com>

Ĉina Instituto de Esperanto: <http://ciesp.cn>

Soneto al Amikoj

■ *Hu Guozhou*

Hodiaŭ por mi estas dato bela,
pro esperantisteco sesdekjara,
kun verda koro dumvive fidela.
Mi donas listojn pri laboro fara.

Mi verkis kaj tradukis senripoze,
devkonscie per kaj por Esperanto,
kultivis ĝardenon verse kaj proze,
ĝis la jubileo de diamanto.

Multaj intimaj amikoj trans maro
salutas okaze de l' jubileo.
Mi kore dankas pro la solidaro,
kiu kunigas nin per sam-ideo,

pro via zorgo al peno fruktdona,
al dulingva tajpad' plurmilion!
La 22-an oktobro 2016



L' Unua Neĝo

■ *Celumio*

L'unua neĝo
versajnas mes' en vintro
kun briza preĝo.

Natura duŝo
min banas per torente
neĝera tuŝo,

jen kiu de mi
flirtantas er' post ero
salute al vi.

Neĝ'sur surtuto
degelas iomgrade
jam en la tuto.

Herbar' surtera
ankoraŭ brave verdas
pliplie bela.

Akveroj sur el
pinpingloj gutas larme
sen ĉeso iel.

Neĝflokaj ŝutas
en la inspiron. Mia
instinkto mutas.

Spiretu, flaras
aeron freŝan mi, ke
l'animo klaras.

Neĝohomo

■ *Celumio*

Jen rulas granda neĝa bul'.
Ĝi estas lia korpo nur.
Li vestas sin per ruĝa ĉap'
pro lum' de l' suno al la kap'.
Karoto rolas je la naz'.
Neĝplenlas forte funda baz'.
En lia mano flirtas flag'.
Mensogas buŝo el la frag'.
Varmigus tago sub la sun'.
Degelas l' eta vivo nun.



Petrela kaj aglo

■ *Li Weilun*

*Laŭ la melodio Caishangzi
de ĉinesko*

Ŝtormas, muĝas marondoj.
Brilas stelo en malhelo.
Ho, ĝi estas petrela!
Aglo ŝvebas tra nuboj.
Ĉu kaĝbela ĝia celo?
Al ĝi plaĉas ĉielo.



Pensoj post vizito al la loĝejo de SOONG Ching Ling

■ *Rafael Henrique Zerbetto*

Antaŭ nelonge mi aperigis artikolon kaj ankaŭ videoreporton pri la loĝejo de SOONG Ching Ling. Por prepari ilin mi devis unue esplori pri ŝi kaj ŝia loĝejo en Pekino, sekve viziti la lokon kaj aldoni al la teksto kromajn informojn akiritajn dum la vizito. Tamen, la vizito donis al mi multe pli da informoj kaj temoj por pripensi ol mi kapablis antaŭvidi.

Kiel menciite en la pasinta artikolo, speciale kaptis mian atenton la simpleco de tiu elstara virino, kiu ŝatis kuiri, kolekti fruktojn por fari konfitaĵojn kaj bredi kolombojn, al kiuj ŝi donis la nomojn Paco, Amikeco, Disvolviĝo, Markolo, Reveno, Unuiĝo, Ĉinio, Riĉeco, Prospero, Mondo, Feliĉo kaj Unuo por esprimi bonvolon kaj unuigon de Ĉinio.

En ŝia kuirejo mi vidis grandan paton, konatan kiel kurban paton aŭ wok, similan al tiu, kiun mi uzas por kuiri hejme. En Ĉinio kaj multaj najbaraj landoj homoj kuiras per tiuj patoj, dum en Brazilo homoj preferas kuiri per potoj. En Ĉinio kurba pato estas uzata ne nur por friti, sed ankaŭ por boligi, prepari supon kaj diversajn aliajn manĝaĵojn kuiratajn en Brazilo per potoj. Mi konfesas ke post unu jaro loĝanta en Ĉinio mi tiom al kutimiĝis al kurba pato, ke ĝi porĉiame estos nepra ilo en mia kuirejo.

Alia diferenco inter Brazilo kaj Ĉinio rilate al kuirado estas tio, ke en Ĉinio la plej grava ilo por tranĉi viandojn kaj legomojn estas viandhakilo, kutime ne trovebla en brazila kuirejo. En Brazilo estas plej



populara la ordinara kuireja tranĉilo, ankaŭ konata kiel franca tranĉilo. Tuj post mia transloĝiĝo al Ĉinio mi aĉetis tian tranĉilon por uzi en mia kuirado, sed post provi la ĉinan viandhakilon mia tranĉilo fariĝis duaranga en mia kuirejo, kaj mi uzas ĝin nur fojfoje kiam mi bezonas fari delikatan laboron kiel senŝeligo. Kompreneble ĉina kuirtranĉilo ankaŭ fariĝis nemankebla en mia kuirejo!

Sed rigardante la paton uzitan de SOONG Ching Ling, mi imagis ŝin kuirante la pomojn el sia korto por fari konfitaĵojn kaj subite venis al mia memoro la brazila poetino Cora CORALINA, kiu ne nur estis bonega kuiristo kaj ŝategis fari konfitaĵojn de fruktoj el sia ĝardeno, sed ankaŭ havis tre simplan vivon kaj kuiris per... kurba pato simila al tiuj uzataj en Ĉinio! Tiu pato estas tradicia kuirilo en Brazilo, uzata jam de jarcentoj, kaj en la portugala ĝi nomiĝas tacho, dum la kurba pato uzata en orientazia kuirarto estas konata kiel wok kaj ekpopulariĝis en Brazilo nur dum la lasta jardeko. Tacho kutime estas farita el bronzo, kaj estis nemankebla en brazilaj kuirejoj dum kolonia epoko, uzata por friti, boligi, fari dolĉaĵojn kaj konfitaĵojn, sed en nuntempa Brazilo ĝi fariĝas raraĵo en apartamentoj de grandaj urboj, kie aziaj kurbaj patoj siavice fariĝas pli popularaj.

Mia familio en Brazilo loĝas en granda domo, kun granda kuirejo, kaj en ĝi troveblas kelkaj antikvaj tacho-j, faritaj permane per antikva metodo, kiuj apartenis al miaj prauloj kaj daŭre utilas al ni. Mia



avino kutimis prepari dolĉaĵojn per ili dum mia infaneco, kuirante dum horoj sur bruliĝanta ligno en forno farita el brikoj, kaj nuntempe mia patrino daŭrigas tiun tradicion. Alia agrabla memoraĵo kiun mi havas de tiuj patoj estas la bongustega porkaĵo kiun ni manĝas dum Kristnasko kaj Novjaro, ankaŭ kuirita per ili. Tiu kombinaĵo de malrapida kuirado, kupra pato, bruligado de ligno kaj brikforno donas al la manĝaĵo specialan guston. Sed kiel povas esti, ke tiu kuirilo trovebla en brazila kuirarto jam de jarcentoj estas tiom simila al tiuj uzataj en Ĉinio?

Mi subite suspektis pri ĉina influo en brazila kuirarto pere de la komercaj rilatoj kun Makao, siatempe sub kolonia regado de Portugalio, kaj sudĉinaj provincoj dum la kolonia epoko, kaj post rapida esploro en interreto mi malkovris la ekziston de antikvaj ĉinaj patoj faritaj el kupro! Sekve mi rimarkis, ke vortaroj kaj enciklopedioj kutime ne distingas inter tacho kaj wok! En ĉiutaga uzo de la portugala lingvo, tamen, tacho estas uzata por brazila kaj la neologismo wok por azia kuirarto. Alia distingo estas la materialo kaj la uzo: la brazila tacho daŭre estas farita el bronzo kaj kutime uzata sur tradiciaj fornoj kiuj uzas fajron el brulligno, dum la vorto wok ligiĝas al modernaj patoj kiuj ne oksidiĝas nek gluiĝas al la manĝaĵo.

Sed ne nur kuirarto kaptis mian atenton dum la vizito al la loĝejo de SOONG Ching Ling: tie ŝi gastigis



multajn politikistojn kaj intelektulojn de Ĉinio kaj eksterlando. Tie okazis bankedoj kaj la manĝaĵo estis kuirita de ŝi mem: kia kontrasto kun la pasinteco! Ĉina imperiestro bezonis grandegan servistaron por lukse vivi en gigantaj palacoj, dum Soong Ching Ling, tiom grava en la politika vivo de la nova Ĉinio, preferis vivi modeste kaj kuiri por si mem kaj siaj gastoj.

Pensante pri tio subite venis al mia kapo la sperto de esploristino, kiu decidis rakonti al afrika tribo la dramon Hamleto, de Ŝekspiro, por testi ĉu ĝiaj moralaj dilemoj estas ja universale komprenataj. Dum rakontado pri la reĝo de Danio, oni pridemandis ŝin: “kiom da edzinoj havas tiu reĝo?”, kaj ŝi klarigis, ke en dana socio oni ne rajtas havi pli ol unu edzinon. “Tro malmulte – respondis maljunulo – reĝo bezonas

plurajn edzinojn kaj gefilojn, por ke ili laboru kaj kuiru por la tuta tribo okaze de festotagoj”. Ŝi do klarigis pri tio, ke en eŭropaj socioj la registaro dungas homojn por labori kontraŭ salajro, pagata per mono kolektita kiel impostoj. “Tio malbonas, – komentis la maljunulo – ĉar kiam reĝo postulas pagon de impostoj la popolo malĝojas”.

La pago de impostoj estas nepra en moderna ŝtato, nur primitivaj socioj estas regeblaj sen ili. Laborforto, tamen, troveblas ekster la familia rondo, tiel ke oni ne nepre bezonas multajn edzinojn kaj gefilojn por efike labori. Modeste, ofte en soleco, Soong Ching Ling faris multon por la ĉina popolo sen dependo de grandaj konsumoj nek homfortoj; ŝiaj iniciatemo, laboremo kaj strategia kapablo estis la ŝlosiloj de la sukceso, kaj antaŭ ĉio venas la idealo kunlabori en konstruado de pli justa kaj egaleca socio. Jen konduto imitinda ne nur de ĉinoj, sed ankaŭ de alilandanoj.

el EPC ĉe espero.com.cn

Rafael Henrique ZERBETTO, bakalaŭro pri literaturo el Brazilo, konatiĝis kun Esperanto en 2006 kaj tuj engaĝiĝis en la junulara movado, unue kiel redaktoro de la revuo Momenton! sekve kiel prezidanto de BEJO kaj de la LKK de la 70-a IJK. Li partoprenis en diversaj internaciaj E-kongresoj kaj kiel reprezentanto de UEA kaj TEJO li partoprenis en Rio+20 kaj en Monda Junulara Konferenco 2014. Aktuale li studas interlingvistikon en Poznano, Pollando kaj laboras en El Popola Ĉinio.



Du ĉinaj esperantistetoj en IJK 2016 Nitra



Trilandaj junuloj en IJK 2016 pollando

